



LINGVO INTERNACIA

Monata gazeto por la lingvo Esperanto.

REDAKCIO
Paris

27 Boulevard Arago 27
PAUL FRUICIER
ĉefredaktoro.



ADMINISTRACIO
Szegárd
Hungarujo (Hongrie)
PAUL DE LENGYEL
direktoro.

Ĉiuj klarigoj pri abono, anoncoj, manuskriptoj k. c. estas sur la lasta paĝo.

LA REĜO DE ITALUJO.

Kvankam princo, oni tamen estas homo je ia flanko, kaj, eĉ sidante sur trono, oni povas esti ĵaluza al sia proksimulo. Kiam li iras sur la Romaj stratoj, Viktoro Emanuelo III-a kun envio rigardas iajn vilaĝanojn paŝantajn kun bastono en la mano, aŭ eĉ almozulojn sin revarmigantajn per la radioj de l' suno kontraŭ palaca kolono. La kaŭzo estas, ke ili estas altakreskaj, havante larĝan bruston, kaj la reĝo volonte donus duonon el siaj milionoj por similiĝi al ili. Sed ĉio ne estas aĉetebla, almenaŭ ĝis nun.

Li estas malalta, la reĝo, kaj iom nesagete ĉagreniĝas pri tio. Oni ja povus lin rememorigi pri Eŭropa monarĥo, sufiĉe konata en Italujo, kiu estis ankaŭ tre malalta, kaj lasis tamen faman postsignon sub la nomo Napoleono, — pri alia malaltulo nomata Cesaro, kiu en Romo mem iom sin grandigis historie, sed tio ĉi estus vana klopodo. La reĝo ne tiel malantaŭen pensas, li nur revidas sian patron, sian avon « *il re galantuomo* », kiuj

pasas antaŭ liaj okuloj, kun bela mantelo sur siaj fortegaj ŝultroj, rajdante tra urboj ĝojantaj, dum iliaj militistaj lipharoj swingiĝas pro la blovo de l' aplaŭdoj.

Tiam, Viktoro Emanuelo III-a ĉagreniĝas pri siaj maldikaj ŝultroj; vane li levas siajn lipharojn, li ne povas doni al ili tiun ŝajnon heroan kaj bonulan, pri kiu estis fieraj la oficialaj sekvantaroj, dum la epoko de la du antaŭaj monarĥoj.

* * *

La Reĝo de Italujo estas antaŭ ĉio lernemulo. Lia scivolemo aperas pli volonte pri la sciencoj ol pri la literaturo, precipe rilate al la historio kaj geografio. Li fieretiĝas, tial ke li ne estas konanto la literaturajojn, kaj ne amas la poetojn. Gabrielo d' Annunzio, ekzemple, ne posedas lian favoron.

Antaŭ nelonge, oni parolis pri « *La Fajro* ».

— Mi ne estas kapabla prijuĝi, — diris la reĝo, — sed la verko ne plaĉas al mi.

Kontraŭe, la scienculoj estas amataj de li, kaj la historiistoj estas liaj favoratoj, speciale la militaj, de Xenofon ĝis Joinville, de Titus Livius ĝis Froissart aŭ Marbot.

En la nuna tempo, li sekvas ĉiutage sur geografia karto dissurmetita je standardetoj, la agojn en Transvaalujo, kaj nenio rilata al tio ĉi estas presita en la gazetoj Anglaj, Amerikaj, Germanaj aŭ Francaj, kion ne legis la reĝo.

Kvankam pli volonte Anglama pro siaj edukiteco kaj politikaj rilatoj, li ne povas ne admiri la Boerojn, kaj li pli ol unufoje, inter sia ĉirkaŭularo, laŭdis Botha, de Wet, kaj iliajn kunbatalantojn. Oni devas kredi ke lia seriozega juneco tre grandigis en li la senton de l' Devo, ĉar li montras tiun ĉi senton ĉiuokaze. Vesperon, dum postmanĝa interbabilado, tiam, kiam li estis nur estro de la 1-a regimento de infanterio, juna nobelo, havante la dorson antaŭ la kameno, varmege entreprenis al militon de la « Aŭstraj Provincoj » kaj ekkriis subite kun entuziasmo:

— Via Reĝa Moŝto! Kiom da plezuro mi havos, marŝante ĉe via flanko, kiam vi donos la signalon por la ekiro!

— Vi marŝos ĉe via vico, en via regimento, kiel mi marŝos antaŭ miaj soldatoj, — respondis rigide la reĝido, — kaj ambaŭ ni atendos la ordonojn de niaj estroj, tiel en la paco, kiel dum la militado.

La fajra kapitano staris tute konfuzita.

Oni divenas ke, kun tia karaktero, la reĝo ne amas la kortegistojn. Li mem estas tre avara je komplimentoj.

Tio ĉi kaŭzis komence grandan bedaŭron en la kortego kutiminta al la afablaĵoj iom komunaj sed ĉiam plezurodonaj de Humberto.

Tiu ĉi estis ja treege afabla. Oni ne memoras pri malagrabra vorto de li — kaj la komplimentoj elfaladis el sia buŝo, eĉ kelkfoje laŭ embarasanta maniero. Ekzemple, antaŭ kel-

kaj jaroj, oni pripensis aranĝi en Romo novan Ekspozicion. La sindiko, maljuna Romano, iris viziti Humberton kaj diris:

— Via Reĝa Moŝto! Tia entrepreno estas neebla. Ĝi estus malsukceso, kaj anstataŭ porti la respondecon, mi preferus ekŝigi.

— Bone! Vi agas kiel vera amiko de Romo, — diris la reĝo.

Kelke da tagoj poste, ministro Baccellio kaj partianoj de l' Ekspozicio iris proponi sian programon al la sama reĝo Humberto.

— Tio ĉi estas tre bona, — diris li; — oni vidas ke vi efektive amas nian belan Roman urbon!

Oni iom ŝanceliĝis, en la ĉambro, kiam ĉiu el la du partioj prezentis sian respondon de l' reĝo.

Verŝajne, tian malbonaĵon rimarkis la filo, kaj, laŭ la kutimo, por ĝin eviti, li emas la malan malbonan econ. Komplimento de li estas tiel rara kiel meritita. « De avara patro, malavara filo », diras proverbo. Ŝajnas ke Viktoro Emanuelo III-a aparte atentis por eviti la malrektaĵojn de sia patro.

* * *

Ne malrespekto estas al la lasta reĝo, diri ke iom rememorigis pri la franca reĝo Henriko IV, pro siaj moroj. En tio, li similis sian patron, la konatan « *galantuomo* ». Ilia populareco ja ne difektiĝis pro tio. En Italujo, kiel en Francujo, amaj aventuroj ne malgrandigas la simpation de l' popolo al la reĝo. Do, ne malicdirante, oni povas skribi ke Humberto estis aminda, kaj amisto.

Kontraŭe, Viktoro Emanuelo, de sia edziĝo, afektas sin deteni de la virinoj. Apenaŭ li alparolas ilin dum la kortegaj kunvenoj; eĉ li salutas pasante, ĉiam nenion dirante, tiujn, kies salonojn li ofte vizitis dum sia fraŭleco.

Estas vere ke la monarĥo amas varme kaj videble sian edzinon. Tiu reĝa paro pre-

zentas ĉarman apartecon: ĝi estas simpla, unuigita, hejmamanta, kiel paro da junaj geburgoj.

Reale, Viktoro Emanuelo deziras esti la sola influanto sur la reĝinon Helenon. Ŝi, kiel Montenegrino, obeas al li, nemurmurante, plenumas la plej malgrandajn dezirojn de l' familiestro, kaj demandas lin pri la plej malgravaj detaloj de l' vivo. Tagon, la gereĝoj estis tuj elpromenontaj; la reĝino, havante sian ĉapelon sur la kapo, renkontis dukinon de C***, kaj demandis ŝin kiel estas ŝia ĉapelo. La dukino konsilis ĝin ŝanĝi, kaj la reĝino ekreiris sian ĉambraron.

La reĝo, alveninte, demandis kien ŝi iras.

— Dukino de C*** diris al mi, ke mia ĉapelo ne taŭgas, kaj mi iras por alian surmeti.

— Al dukino de C*** tute ne rilatas via tualetto. Mi deziras, ke vi konservu ĉi-tiun ĉapelon.

Kaj irinte al la dukino, li diris:

— Volu ne konsili la reĝinon. Nur al mi apartenas tio ĉi.

En la sekvanta vespero, ĉambelano konsilis al la malfeliĉa dukino, ke ŝi iru pasigi kelke da tempo sur sian bienon.

Pro tio, oni povus kredi, ke la reĝo havas karakteron malmolan kaj rompeman, sen indulgemo aŭ ridetemo. Nur ŝajne! Kiam oni lin plie konas, oni eksciigas pri rekta animo, aminda spirito kaj ia bonuleco. Tiel, unu el liaj ĉambristoj estas honesta familipatro, hav-

anta multe da gefiletoj. La reĝo, kaŝate, metas ofte bonbonojn kaj frandaĵojn en sian poŝon, kaj ilin donacas al lia servisto por liaj buboj.

* * *

Resume, la reĝo estas ĝis nun malbone konata de l' publiko, ĉar ĝi absolute malamegas la publikigon. Kion ajn oni diras, malbonaĵojn aŭ ne, li havas instinktan teruron al la gazetoj parolantaj pri li.

Estas certe ke, pro sia edukiteco kaj pro la evolucio de Italujo dum lia juneco, li pli amas Anglujon kaj Germanujon, ol Francujon aŭ Rusujon. Tamen la vojaĝo, baldaŭ farota de li en Sankt-Peterburgon, estas eble ŝanĝema antaŭsigno. Plu ne estas utopio antaŭvidi reciprokajn proksimiĝon de du gentoj latinaj, kiujn unuigas komunaj ligiloj. Jam komencis la reamikiĝon popoloj antaŭe malamikaj fratoj. Tia, kia estas Viktoro Emanuelo III-a, ĝi ne estos li, kiu kontraŭstaros. Pri reĝino Heleno, tio, kion ni scias pri ŝiaj spirito kaj koro la mallongaj ligiloj, kiuj ŝin unuigas kun Rusujo, ŝia varmega deziro efektiviĝi la Kristanan pacon priparolitan de ŝiaj unuaj instruantoj, ĉio ĉi garantias al ni, ke ŝi kiel eble plej multe klopodos fondi idealon de amo kaj paco, en tiun ĉi saman « Eternan Urbon » kies tridekcentjara historio rememorigas pri tragediaj bataloj, kaj tronoj surŝprucigitaj je sango.

Johano Darcy.

El la gazeto « *La Soleil* » (La Suno)

(Tradukis HENRI RAMIER.)



Rusa legendo pri apostolo Andreo.

(El la rusa kroniko de l' XII-a centjaro.)

La rivero Dnepr enfluas en la maron Ponto per larĝa buŝo. Tiu ĉi maro estas nomata *rusa*, kaj sur ĝiaj bordoj predikis apostolo Andreo, frato de Petro, kiel diras la tradicio.

Apostolo Andreo komence predikis en la urbo Sinopo kaj poste venis en Korsun (Ĥerson). En Korsun li sciigis, ke proksime de la urbo estas la buŝo de la rivero Dnepr.

Kaj li deziris iri Romon kaj venis en la buŝon de Dnepr. De tie li iris per Dnepr kontraŭ la fluo — kaj okaze li venis kaj haltis antaŭ la montoj, kie nun estas la urbo Kijev. La sekvantan tagon li levis sin kaj diris al siaj kunuloj: « Rigardu tiujn ĉi montojn! Sur ili brilos la favoro de Dio kaj estos granda urbo, kaj multaj preĝejoj estos konstruitaj kun helpo de Dio. » Li iris sur la montojn, benis ilin, starigis sur ili krucon kaj preĝis Dion. Poste li deiris de la montoj kaj iris pluen per Dnepr. Li venis en la teron de Slavoj, kie nun estas Nov-

gorod. Li observis la homojn, kiuj loĝis tie, kaj iliajn kutimojn; li vidis, kiel ili sin lavas kaj vipas sin per vergoj, kaj estis tre mirigita. Post tio li iris en okcidentan Eŭropon kaj fine venis en Romon kaj rakontis, kie li predikis kaj kion li vidis sur la vojo kaj diris: « Kun granda miro mi vidis la teron de Slavoj, kiam mi venis tien ĉi. Mi vidis iliajn vaporbanejojn, kiuj estas konstruitaj el arbo. Oni hejtas ilin varmege; la homoj senvestigas sin kaj fariĝas nudaj. Tiam ili verŝas sur sin ian acidajon, prenas freŝajn vergojn kaj komencas vipi sin kaj vipas tiel forte, ke ili eliras el la vaporbanejo apenaŭ vivaj. Tiam ili verŝas sur sin malvarman akvon kaj reviviĝas. Tion ĉi ili faras ĉiun tagon. Neniu ilin turmentas, ili mem turmentas sin, ĉar tio ĉi estas ne lavado, sed turmentado. » La aŭskultantoj tre miris pro tiu ĉi rakonto. Andreo restis kelkan tempon en Romo kaj revenis Sinopon.

Tradukis V. Laskin.

RIMARKO. En la urbo Kijev sur la plej alta loko de la bordo de Dnepr estas konstruita la preĝejo sub la nomo de Apostolo Andreo Unuavokita. La rusoj kredas, ke tie ĉi estis starigita de la apostolo la kruco, pri kiu diras la legendo. La vido de tiu ĉi loko sur la malsupran parton de Kijev kaj sur la riveron Dnepr estas tre majesta. En la legendo oni devas turni atenton sur la ironian priskribon pri la rusaj vaporbanejoj kaj pri la kutimo vipi sin per la vergoj en la banejo. Tiu ĉi kutimo en plena forto konserviĝis ĝis nuna tempo, precipe inter la vilaĝanoj.

La tradukinto.



—◆◆— TAMEN. —◆◆—

El ĉiuj krudaj ofendantoj
 Ŝi certe estis la plej pika,
 Kaj inter la malbonfarantoj
 Ŝi montris sin plej malamika.

Mi tamen ĉiam kun persisto
 Adoras l' etan Veronikon:
 Laŭ la instru' de bona Kristo
 Mi amas mian malamikon.

* * * * *

AMIKO.

*Al mi neniam plaĉis mez',
 Min ĉiam tiris antitez',
 Kolera maljuna vino,
 Timema juna fraŭlino.*

AMIKO.

MOMENTOJ.

Ili ridegis per sensenca, infana rido, klinigante posten la kapojn, kiam en varma bankuveto la akvo plaŭdadis sub la batoj de iliaj dikaj manetoj.

Ili senzorge ridadis, libere petolante, kurante sur herbejoj, supersaltante malebenajetojn kaj penante kapti unu la alian. Iliaj vangoj estis flamantaj per sana infana purpuro kaj la okuloj larĝe malfermitaj avide kaptadis impresojn de l' ekstera mondo.

Ili ridadis per gaja, sana rido de l' juneco, ridadis tial, ke la suno estis lumanta, ke arboj, kvazaŭ interkonsiliĝante, balancadis kun graveco la verdajn suprojn; ke floroj bonodoradis, birdoj kantadis, kaj tial, ke la juneco, ilia ĉarma juneco, al ili ŝajnis eterna.

Konfuzitaj, kun larmoj sur la okuloj, kun svenanta koro, kun tremo de la tuta korpo, ili ridetis, kiam la unua kiso ŝetis ilin en ĉirkaŭprenoj reciprokaj kaj ili ekkonis la senmezurblan ĝojon de la amo.

Ili ridis per kontenta feliĉa rido, kiam ilia filo je la unua fojo al ili eketendis konscieme la manetojn kaj ekbalbutis la unuan homan vorton.

Bonanime kaj malsevere ili ridetadis spertaj kaj maturaj homoj, ĉirkaŭ si rigardante junularon, aŭdante ĝiajn naivajn bravajn paroladojn.

Balancante la grizajn kapojn, iom malboneme ili subridadis, prijuĝante, ke ĉiam tiel same la kaduka mondo militas, mensogas, ĉikanas kaj malamas, kiel dum la tagoj de ilia malproksimega juneco . . .

Ili ne ridis plie . . . Ili estis kuŝantaj orname vestitaj, kovritaj de floroj. Kandeloj bruladis ĉirkaŭe, — homoj kun okuloj plenaj je larmoj, iradis kaj vere aŭ nevere malĝojiĝis.

Ne estis ili ridantaj; sed ia facila, apenaŭ rimarkebla rideto ekrigidiĝis sur la malvivaj lipoj.

Pro kio ili ridetis nun? Eble la enigmon de la vivado ili komprenis? Aŭ malfermiĝis al iliaj spiritaj okuloj la nesciata alia mondo, kie malsanoj kaj malĝojo ne ekzistas? . . . Ĉu ili vidis anĝelojn aŭ mirinda ĉiela muziko dolĉigis iliajn orelojn?

Aŭ eble tio estis simpla ironio, la profunda malbona ironio al tiuj, kiuj restis vivantaj?

El la rusa lingvo tradukis **A. Vejtcler.**



SOLVITA.

Li petis kison. Ŝi sulkgis la frunton meditante.
— Kiso, — ŝi ekdiris, — esprimo de la penso estas. Sur la mano, ĝi respekton esprimas; sur la frunto, amikecon; pli malsupre, kaj amikecon kaj respekton — kaj pluon. Ĉar vi petis, esprimu vian senton kise! Go on!*)

Li ŝanceliĝis. Per respekto kaj amikeco estas atingebla l' amo. Sed . . . Se li trokuraĝus,

*) Angle: daŭrigu!

tiam . . . Li rigardadis la herbon tre pripensante. Li provis legi ŝiajn sentojn. Li estis dononta al ŝi tiun ĉi solan kison . . .

Li ekaŭdis trilon kvazaŭ de multaj birdoj kaj levigis sian rigardon. Ŝi fajfetis. Ŝia ĉapelo estis malsupren tirita ĝis la okuloj kaj kaŝis la frunton, kaj ŝiaj manoj estis profunde enŝovitaj en la poŝojn de l' surtuto.

La problemo estis solvita.

Tradukis **P. Ahlberg.**

— EL BODENSTEDT. —

<i>Edziĝo estis en vilaĝo,</i>	<i>Ho! kiajn riĉajn belajn donojn</i>	<i>Edziĝa paro kaj la gastoj</i>
<i>La gastoj saltis kaj festenis;</i>	<i>Ricevis juna la pareto!</i>	<i>En tombo longe jam putriĝis,</i>
<i>Al la festeno tiu gaja</i>	<i>Sed la kantisto al la festo</i>	<i>Putriĝis ĉiuj la donacoj:</i>
<i>Kantisto unu tiam venis.</i>	<i>Nenion portis krom kanteto.</i>	<i>Kanteto viva nur restiĝis.</i>

(El germana lingvo.)

A. I. Sjemjonov.



Hispana letero de amo.

Post la batalo de Santiago, kiam la Unuigitaj Ŝtatoj kuracistoj venis sur la kampon por helpi la vunditojn, la kuracisto Wynne trovis, en la alta herbo, Hispanan militiston, mortintan jam de kelkaj horoj.

S-ro Wynne trovis, en lia poŝo, sekvantan leteron, kiun li donis al kapitano Berg, kiu ĝin portis al la redakcio de la New-Yorka «The World», kun la espero ke Manuelino eble povus sciigi pri la sorto de Antonio.

Jen estas ŝia letero:

San-Pedro de Anca, la 2-an de febr. 1898.

Kara kaj amata Antonio!

Sendinte al vi miajn plej bonajn bondezirojn kun tutaj miaj koro kaj animo, mi al vi diros ke mi ricevis du el viaj leteroj. Estus neeble diri al vi kiom da feliĉo mi sentas, sciiginte per ili ke vi ĝuas sanon, kaj mia koro pleniĝas je ĝojo, ĉar via koro ne ŝanĝiĝis pri mi.

Amata Antonio mia, mi jam lernis parkere viajn leterojn. Estas unu parto de via lasta sciigo, kiun mi ne povas kompreni, kvankam mi ĝin ripetis al mi kelkfoje. Vi diras ke mi

vin tre dolorigis kaj ke vi suferis pro la malpacienco de miaj leteroj.

Vi devas ne riproĉi min. Ĉu vi memoras ke en la sama letero vi diris ke pro kaŭzoj, kiujn vi ne povas klarigi al mi, vi decidis ne skribi ree al mi, ĝis vi liberiĝos el la milita servado? Tiuj vortoj el via plumo ŝajnis mia ordono de morto.

Estis tiel kiel se vi al mi tranĉus la koron. Mi deziris la morton, ĉar mi kredi ke ĝi estas la sola rimedo por pacigi miajn suferojn. Mi ne intencas malpacigi vin.

Estis en miaj pensoj la memoro pri multaj historioj de militistoj kiuj promesas al siaj amatinoj ke ili edziĝos je ili, — kaj reveninte el la militado, edziĝas je alia. Mi ne intencas diri, ke vi faros tion, — sed estas tiel multaj kiuj faris tiele!

Mi estas malsana, en lito, kun miaj doloroj, sed mi neniam diris mian sekreton al iu. Mi estas tiel maldika kaj pala, ke mi min apenaŭ rekonas. Se vi forgesus min, la doloro estus sufiĉa por elpreni mian vivon.

Se vi sciis kiel multe mi suferis dum via malĉeesto, mi estas certa ke vi havus kom-

paton al mi. Sed mi restos ĉiam silenta, ĉar per ĉiuj aferoj en la mondo mi ne volus vin malfeliĉigi. Estas sufiĉe ke mi konservu kun mi mian doloron. Se vi ĉiam estos mia, do mi kredos ke mi estas la plej feliĉa persono en la mondo.

Ne malpacigu vin pro mi, kara, ĉar, dank'

al Dio, mi sentas min pli bonan nun. Mi kalkulas la minutojn ĝis tiu longeatendita nia renkonto.

Bondezirojn de mia familio; — kaj vi, plej kara posedanto de mia vivo, ricevu la koron kaj amon de unu kiu neniam forgesos vin!

MANUELINO.

Tradukis Edward L. Steckel.



Bona respondo.

La amiko de la pastrestro Swift al li sendis iajoje rombon*) per juna servisto, kiu ofte jam estis farinta tielajn komisionojn, neniam ricevinte de l' pastro malplej grandan signon de donemo. Enirinte en la domon, la junulo malfermis la pordon de la laborĉambro de l' pastro, kaj, rapidege metante la fiŝon, diris laŭte:

— Rombon al vi sendas mia mastro.

— Junulo, — diris Swift, — tiel vi plenumas viajn komisionojn! Mi volas doni al vi lecionon de ĝentileco; sidiĝu sur mian apogseĝon, ni

*) « Rombo » estas plata mara fiŝo, kies viando estas tre delikata. *Rimarko de l' tradukintoj.*

ŝanĝos tuj nian rolon, kaj mi montros al vi, kiel vi devas konduki en la estonteco.

Nia knabo sidiĝis, kaj la pastro iris de l' pordo al la tablo per paŝo respektplena, faris profundan riverencon, kaj diris:

— Via pastra moŝto, al vi mia mastro sendas saluton; li esperas, ke vi fartas bone, kaj petas vin akcepti tiun ĉi donaceton.

— Vere? — respondis la servisto, — diru al li grandan dankon de mi, kaj por vi mem prenu tiun ĉi duonkronon.

Tiel devigita esti malavara, la pastro bonkore ridis kaj al li donis unu kronon.

Tradukis Th. Cart kaj M. Pagnier.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA.

GAZETOJ RONDIRANTAJ.

La esperantistoj eble ekkonos interesiĝe rimedon malgrandan, kiu tamen povos fariĝi utiliga, se oni disvastigos ĝian uzadon inter la esperantistoj.

Supozite, kelkaj esperantistoj grupiĝas (ĉu samlokaj, ĉu diverslokaj) kaj promesas ke, de tempo al tempo, kiam oni volos, ili skribos unu al la aliaj. Tio fariĝas jam amikiĝotaro,

kio, preter korespondado, kiel grupo povos fari sendube multe pli por Esperanto ol negrupitaj personoj. Sed, kion oni tro ofte ne atentigas, korespondante, tio certe estas interkorektado de l' mankoj aŭ eraroj stilaj aŭ gramatikaj. Tio devenas de l' preskaŭa neebleco, kiun oni trovas por tio: ne estus konvene korekti la erarojn kiujn korespondanto faris en sia lasta letero.

Aliflanke (certe malprave, sed tio estas kaj estos ĉiam, mi pensas), multaj esperantistoj ne prenas ĝenerale sufiĉe da tempo por la bona kaj plena ellerno de nia lingvo. Tamen estus plej utile por nia afero ke ĉiu esperantisto sciu, almenaŭ post kelka tempo, kaj bone skribu nian idiomon, kiom da ili hodiaŭ longe post la tempo kiam ili ekkonis Esperanton, ankoraŭ ne posedas ĝin verdire, kaj restos ankoraŭ longe en tia stato!

Do rimedo, interesa lernigilo estas necesa: neniuj elprenus el sia tempo parton por fari temojn aŭ tradukojn skribe, sed la Rondiranta gazeto tion povos farigi.

Jen estas tio, kion mi nomas *Rondiranto*. Kiam kreiĝas grupo, unu membro, la plej sperta, prenas la direkton de vera gazeto redaktota de ĉiu membro; ĉiu membro tiam ricevas numeron ordan kaj poste skribas tekston esperantan sur unu flankon de folio papera, lasante la dorson blanka.

Ni komencu kun la gazeto: la n-ro 1-a faras tian tekston kaj ĝin sendas al n-ro 2-a. N-ro 2-a korektas dorse la malbonaĵojn de li trovitajn en la teksto. Li ankaŭ skribas tekston sammaniere, kaj ĉion sendas al la n-ro 3-a. Tiu ĉi korektas la foliojn 1. kaj 2. kaj verkas ankaŭ tekston. Li ankaŭ ĉion sendas al la n-ro 4-a kiu agas kiel la antaŭintaj. Tiamaniere, ĉiu membro aldonas al la formiĝanta gazeto propran tekston.

Kiam la Rondiranto revenas al la 1-a, tiu deprenas sian unuan folion, kies dorso enhavas la korektaĵojn de ĉiu alia membro, kaj li, korektinte la tekstojn restantajn, enmetas novan tekston. Li sendas denove la gazeton al la n-ro 2-a, kiu deprenas sian unuan folion, remetatas alian, korektas la tekstojn de alimembroj, kaj la gazeton sendas al la n-ro 3-a.

Tio faras veran, senĉese rondirantan ĵurnalon kiu estas interesa per la diverseco de l' tekstoj kaj la memtento kaj memlaboro, kiujn ĝi postulas de ĝiaj legantoj.

Klariginte la ĝeneralan organismon de Rondiranto, mi lasas flanke la detalajn punktojn kiuj

ankaŭ devas esti fiksitaj por bone sukcesi: regularo de l' rondo, — raporto de l' rondestro en la gazeto pri la afero, — tempo lasota al ĉiu membro por la lego, — maniero por korekti, — speciala naturo de l' artikoloj k. t. p.

Rondiranto Internacia estis organizata de mi antaŭ kelkaj monatoj, inter membroj Eŭropaj: unu persono en ĉia lando Eŭropa. Ĝi iradas tra nian kontinenton kaj kvankam ĝi bezonas ankoraŭ membrojn en Danujo, Holando kaj kelkaj aliaj landoj, ĝi jam bonege sukcesas kaj certe bonigas iom post iom la stilon de siaj farantoj.

Tian rondon internacian (tiu ĉi estas titolita *Rondo Internacia Literatura l' Unua*) oni malfacilete organizas, sed estos pli facile en ĉia societo (mi nature ne parolas pri tiaj, kiel S. p. p. E., kie Rondiranto vagadus jarojn) gvidi similan gazeton.

Rondirantoj helpus Esperanton, esperantistojn, gazetojn kaj societojn esperantajn.

Mi volus ankoraŭ kelkajn vidpunktojn montri: Rondirantoj estos ĝenerale faritaj (kiel ekzemple tiu de Philippople — gvidata de S-ro Oreškov) inter membroj de Societoj aŭ inter iaj ajn personoj. Ekzemple oni organizos Rondon Internacian inter Sinjorinoj, samprofesianoj, samurbanoj, samnaciuloj, samstudentoj k. t. p. — ĉu tio ne povus helpi la faradon de verkoj specialaj?

Mi pensas jes, kaj mi finos esprimante la esperon, ke mi utile prenis kelke da loko el tiu ĉi gazeto, parolinte pri Rondirantoj, kaj ke baldaŭ multobligu por kaj pro Esperanto Rondirantoj ĉiulokaj kaj ĉiuspecaj.

P. Bavay

en Douai (Nord), Francujo.

P. S. La personoj kiuj interesiĝus pri Rondirantoj, povos ricevi la regularon de l' « Rondo Unua Internacia » skribante al mi sian deziron. Ĝi estas presita kelkoble kaj povos esti utila por fari saman aŭ proksimuman. Aliflanke, se tiu afero estos akceptita de l' Redakcio de L. I., mi komunikos tiun regularon al la esperantistoj per tiu ĉi ĵurnalo.

Por la Esperantistaj blinduloj.

Estimata Redaktoro,

Ni legis interese l' artikolon de S-ro *Ahlberg* « Pri la blinduloj kaj Esperanto ». Ni opinias kiel li, ke estas sankta devo por ĉiuj Esperantistoj helpi kaj kuraĝigi la disvastigadon de Esperanto ĉe la blinduloj. Agante tiel ni faros agadon ne sole humanan, sed ankoraŭ profitan por nia komuna afero.

Sinjoro *Ahlberg* proponas diversajn rimedojn por atingi tian celon kaj aldonas ke ĉiu trovos konvenan *manieron*. Sed, agante ĉiu laŭ sia maniero, oni dividas la ekfortojn kaj atingos nur sensignifan rezulton. Ni opinias do, ke unu el la plej efikaj rimedoj estus malfermi monoferadon inter la esperantistoj por liveri esperantajn verkojn al tiuj ĉi kompatinduloj kaj eĉ presigi lernolibrojn por la blinduloj, se la kolektita sumo estos sufiĉa.

Kaj ĝi povas esti sufiĉa se ĉiu esperantisto, krom sia propra monofero zorgus interesigi al la sorto de tiuj malfeliĉuloj la korajn personojn el sia konatularo.

Ni esperas ke via sindonema gazeto volos ricevi la monoferojn kaj poste transsendi ilin al la redakcio de « *De blindas vekoblad* » en Stockholm. Ni jam kolektis inter ni malgrandan sumon, kiun ni al vi transsendos, se vi akceptos nian proponon.

Ricevu k. t. p.

Grupeto Esperantista en Samoëns.

Tiun ĉi tre laŭdindan proponon L. I. povas nur tute aprobi. Se aliaj esperantistoj deziras ankaŭ partopreni la monoferadon, ili povos sin turni al la administranto aŭ al la redaktoro de l' gazeto L. I.

La Red.

SCIIGOJ DE L' REDAKCIO.

Ni petas niajn abonantojn, ke ili ne forgesu sendi al la ĉefredaktoro de l' gazeto sian opinion pri la aranĝota de ni konkurso literaturo.

(Vidu L. I. n-ro de januaro 1902.)

*

La franca societo « TOURING-CLUB » eldonis novan propagandan broŝureton, luksan, ilustritan, kiu enhavas, inter aliaj, novelon de la tre konata verkisto franca Pierre LOUYËS.

Tiu ĉi novelo, speciale verkita por la nomita broŝureto, estas do ne eldonita antaŭe, kaj presita france kaj esperante.

Ni havas kelke da ekzempleroj de tiu ĉi broŝureto, kiujn ni kun plezuro sendos afrankite al niaj abonantoj kontraŭ poŝtmarko da 20 centimoj.

Oni volu sin turni al la ĉefredaktoro.

KRONIKO.

El Rusujo.

— S-ro *Piskunov* sendis al ni la n-ro 7-an (23/1. 1902) de « *Orlovskij Vjedomosti* » kiu enhavas longan kaj bonegan artikolon pri Esperanto de S-ro *Boris Golubov*. Estas en tiu ĉi artikolo sciigo pri la « Deklaracio » de S-ro *Leau*, ekzemploj kaj klarigoj pri la konstitucio de Esperanto, sciigoj pri niaj diversaj societoj, gazetoj, niaj adeptoj, k. t. p.

— S-ro *Vs. Lojko* sendis al ni la n-ro 19-an (1/14. II. 1902) de « *Minskij Listok* », en kiu estas presita rusa traduko de l' rakonteto « *Sortdirantulino* » (L. I. n-ro 9-a, j. 1901). S-ro *Lojko*, kiu faris la tradukon, aldonis rimarkon por sciigi al la legantoj, ke la rakonto estas tradukita el Esperanto.

— S-ro *A. Vejtcler* sciigis nin ankaŭ pri artikolo eldonita en la ĉiumonata ilustrita re-

vuo « *Otdih* » (Ripozo) en Peterburg. La aŭtoro de l' artikolo pruvas la neceson de lingvo internacia, kaj esploras kial tiu ĉi devas esti artefarita. Poste, li parolas pri Volapuk, kaj pri Esperanto kaj ĝia historio, kaj konkludas tiel: « Malrapide, sed certege Esperanto al si faras la vojon. Iom post iom ĝi estos propagandata ĉien, kompreneble ne sen batalado. Ĝi estos utila precipe por homoj kiuj ne povis dum sia infaneco ellerni fremdajn lingvojn, kaj ne havis poste sufiĉe da tempo por tio . . . » Oni vidas ke tiu ĉi artikolo estas tute favora al ni.

Nian plej koran dankon al niaj fervoraj amikoj pro iliaj afablaj sciigoj.

El Svedujo.

— **Dank' al la nelacebla sekretario** de l' Klubo Esperantista en Stockholm, la redakcio de « *Korrespondens* » konsentis instrui pri Esperanto, same kiel pri la lingvoj angla, franca kaj germana. S-ro *Ahlberg* komencis sian kurson per komerca letereto, kun elparoloj kaj gramatikaj rimarkoj apude. Tio ĉi estas laŭdinda rezultato.

— **Redaktoro** de « *Ungherrarnes Egen* » presigis grandajn anoncojn en kelkaj Stockholmaj gazetoj por anonci kurson pri Esperanto de li farotan.

— **Aliparte**, la bone konata de gelegantoj de L. I., S-ro *Paul Nylén*, presis en siaj gazetoj sciigojn pri Esperanto. S-ro Nylén ne estas plu en la redakcio de « *Vårt Land* », sed fariĝis la Stockholma reprezentanto kaj la referento al la Sveda parlamento de Gotenburga gazeto « *Göteborgs Handels- och Sjöfartstidning* » (Komerca kaj transmarkomunika gazeto de Gotenburg). Ni estas feliĉaj uzi tiun okazon por prezenti niajn gratulojn al la antaŭa ĉefredaktoro de L. I., ĝojante ke fervora kaj sindonema Esperantisto, kiel li, plibonigis sian situacion, kaj povos tiel pli efike agadi por nia lingvo.

El Francujo.

— **La jarlibro** de S. p. p. E. por 1901 eliris. Ĝi estas sufiĉe dika broŝuro, kiu enhavas 1) Regularon de S. p. p. E. kaj I. K. E. (28 paĝoj), 2) nomaron kaj adresaron de la membroj de l' Societo (78 paĝoj), 3) tabelon pri la situacio financa de S. p. p. E. dum la jaro 1901, 4) anoncojn.

La ordo de l' nomoj kaj adresoj estas farita laŭ nova sistemo, kiu plifaciligas la uzadon de l' libro.

La Societo enhavis en la 15-a de decembro 1901 894 membrojn, el kiuj 9 estas en Germanujo, 8 en Anglujo, 11 en Aŭstrujo, 31 en Belgujo, 4 en Brazilujo, 13 en Bulgarujo, 5 en Kanado, 1 en Ŝilio, 2 en Ĥinujo, 12 en Hispanujo, 5 en Unuigitaj Ŝtatoj Amerikaj, 7 en Finnlando, 3 en Holando, 2 en Hungarujo, 1 en Islando, 8 en Italujo, 1 en Meksikujo, 2 en Monako, 1 en Norvegujo, 3 en Nova-Kaledonio, 11 en Peruo, 1 en Persujo, 3 en Portugalujo, 1 en Rumanujo, 71 en Rusujo, 23 en Svedujo, 11 en Svisujo, 2 en Tunizio, 1 en Turkujo.

— **En Bonneville**, S-ro *Dumont* faris paroladon pri Esperanto en la Urbeŝtrara domo de tiu ĉi urbo.

— **En Besançon**, propaganda kajereto estas eldonita de la tiea Grupo Esperantista. Tute luksa kaj zorgita, kun kovrilo ilustrita, ĝi estas nova kaj tre originala. Aliparte, la Pariza Grupo Esperantista eldonis ankaŭ similan kajereton, pri kiu ni petas niajn legantojn, ke ili vidu la rubrikon « Sciigoj de l' Redakcio ».

— **La gazetistaro.** Neeble citi ĉiujn ĵurnalojn, gazetojn kaj revuojn, kiuj parolis pri ni dum la lasta tempo. Ni nomu okaze « *Le Volume* », « *Lyon Républicain* », « *l'Indépendant des Pyrénées-Orientales* », « *La Dépêche Républicaine* », « *Le Petit Saint-Marcellinois* », « *L'Éclair de Nice* » k. t. p. k. t. p.

El Anglujo.

— **S-roj Charlier kaj Jos. Rhodes** faris paroladon publikan pri Esperanto. La sukceso estis granda, kaj la gazeto « *Yorshire Post* » favore raportis pri la parolado kaj pri nia lingvo.

El Unuigitaj Ŝtatoj.

— **S-ro Geoghegan** sciigis al ni ke favoraj artikoloj pri Esperanto estas presitaj en la gazetoj « *Chicago Daily News* » kaj « *Mekeels Weekly Stamp News* ».

— **S-ro Laisant**, la agema kaj influanta vicprezidanto de l' Grupo Esperantista Pariza ĵus faris vojaĝon tra Unuigitaj Ŝtatoj. Kompreneble, li parolis pri nia lingvo kaj disdonis propagandobroŝurojn, tuj kiam li povis. « Malmultaj esperantistoj estas en tiu lando », li diras, « kaj la nomo de Esperanto estas preskaŭ tute nekonata. Tamen, la ideo ŝajnas tre simpatia al la loĝantoj, kaj mi kredas ke per fortika organizado oni povus krei grandegan movon favoran al ni. »

Jen estas kredeble unu el la kaŭzoj pro kiuj Esperanto ne estas uzata en tiu lando kiel ĝi devus esti: la manko de organizeco. Ni esperu ke la agado de l' nemalproksima Klubo Montreala helpos al tio.

El Belgujo.

Ni legas en « *L' Espérantiste* »:

— **Kapitano Lemaire** donis du paroladojn ĉe Societo « *L' Extension de l' École Normale* » en Bruxelles. Du bonegaj rezultatoj estas la sekvo: 1) kurso de Esperanto estos farata tre baldaŭ en la ĉambroj de l' Societo, de S-ro Lucien Blanjean; 20 personoj estas jam enskribitaj . . . 2) la Societo nomis du delegitojn por la Delegacio aranĝata de S-ro Leau.

El Hungarujo.

— **Unuiĝo de l' Hungaraj Esperantistoj.** Oni sciigas nin el Budapest, ke tie kelke da niaj fervoraj Hungaraj amikoj penadas aranĝi klubon Esperantistan. Sed, ĉar la nombro de esperantistoj en Hungarujo bedaŭrinde ne estas sufiĉe granda por tio ĉi, ili provizore unuiĝis sub titolo « *Unuiĝo de l' Hungaraj Esperantistoj* ». La celo de l' Unuiĝo estas: a) fari propagandon al Esperanto kaj ĝin disvastigi, b) helpi la travojaĝantajn eksterlandajn samideanojn per

konsiloj, kondukoj, loĝejo k. t. p. Prezidanto de l' Unuiĝo estas S-ro *Josefo Miletz* budapesta poŝt oficisto (loĝas en Kispest), vicprezidanto *Ludoviko de Makay*, sekretario *Kajetano Seper*.

Pri la nova « Unuiĝo » ni sciigis kun granda plezuro, kaj ni sendas al ĝiaj fondintoj niajn plej bonajn kaj sincerajn sukcesdezirojn. Nenia dubo, ke Esperanto de nun disvastiĝos multe pli facile kaj daŭre ol en la antaŭa tempo tra Hungarujo, pro la tiea nova fundamento. La plej malgranda grupeto permesas ja unuiĝi la fortojn, kiuj sekve multe pli efikas; kaj oni pli facile aligas al ĝi amikojn aŭ korespondantojn kiuj alie neniam estus fariĝintaj esperantistoj.

El Moravujo.

— **Publikan paroladon** pri Esperanto faris ĉe « *Vlastimila* » (virina societo por edukado) S-ro *Rudolf Fridrich*, profesoro de l' bohema lernejo reala en *Prostějov*. La parolado havis grandan sukeeson. Sesdek personoj ĉeestis. S-ro Fridrich apogis sin sur broŝuroj de Einstein, Moch, Lemaire, de Beaufront, Couturat k. a. kaj elmontris poŝtkartojn ilustritajn skribitajn en Esperanto, kiuj aparte atentigis la publikon.

— **S-ro J. Kajš**, sekretario de l' U. S. A. E., skribis al ni la sekvantan mirigaĵon:

« Oni povis legi en ĵurnaloj ke, en Bohema vilaĝo nomata *Hrádek*, ĉe Reichenberg, oni arestis 13 junulojn, ĉar ili legadis « danĝerajn gazetojn » kaj korespondadis per ia « lingvo mistera ». Ĉe unu el la arestitoj oni trovis lernolibron pri Esperanto; tia estas la nomo, — diris la prokuroro, — de tiu lingvo mistera de anarhistoj kaj nihilistoj »!!!

— **S-ro Ĉejka** skribis longan artikolon por Esperanto en « *Národní Listy* ». Neutile estas fari ĝian laŭdon.

El Bulgarujo.

— **Grupo Esperantista** fondiĝis en *Tirnov* la 4-an de januaro. Tiu ĉi grupo estas nomita « Lumo ». Ĝis nun 23 membroj estas enskribitaj.

Prezidanto : A. Jordanov, vicprezidanto : N. Ĥaralambev, sekretario : Ĥr. Ĥaralambev, kasisto : P. Paskalev, bibliotekisto : C. Lazarov.

Baldaŭan sukceson al la nova Grupo !

— **Kursoj pri Esperanto en Kazanlik.** Dank' al l' iniciativo de niaj estimataj samideanoj : A. Pavlov, St. Kiliov, St. Apostolov, kaj aliaj, en Kazanlik estas aranĝitaj praktikaj kursoj pri Esperanto, sub la gvidado de S-roj Kiliov kaj Vasilev.

Estas elektitaj kiel lernejestro Ivan Dimitrov, kiel bibliotekisto St. Apostolov.

Tridek personoj sekvas regule la kurson.

— **Nova gazeto Esperanta.** La klubo «Stelo» en Plovdiv eldonas novan gazeton ilustritan, ĉiumonatan, Esperanto-Bulgaran, en la celo de propagandi nian lingvon, kaj instrui la legantojn por ĝia plena ellernado. La titolo de l' nova gazeto estas «**Rondiranto**». Ni ĵus ricevis la unuan numeron, kiu enhavas la portreton de D-ro Zamenhof, kaj du fotografaĵojn el Bulgarujo. En la gazeto oni trovas la programon de l' ĵurnalo ; klarigojn pri la lingvo internacia, pri la «**Deklaracio**» de S-ro Leau, kaj nomaro de l' societoj kiuj nomis delegitojn ; ekzercojn pri Esperanto por Bulgaroj ; kronikon, anoncojn k. t. p. Unuvorte, la gazeto, bone presita, bele eldonita, faris al ni bonan impreson, kaj ni tutkore deziras al ĝi bonan farton.

(Oni abonas ĉe S-ro Oreškov, sekretario de l' klubo «Stelo», en Plovdiv [Filipopoli] ; jara abono kostas 3 f. 50 c.)

El Kanado.

— **La Klubo Esperantista en Montreal** ĉiam ageme daŭrigas la propagandon. S-roj Leymarie kaj A. Saint-Martin entreprenis polemikojn en diversaj gazetoj, «**Le Journal**» (Montreal), «**L' Union**» (St.-Hyacinthe), «**Le Trifluvien**» (Trois-Rivières). Tiuj ĉi polemikoj paroligis pri nia afero aliajn gazetojn, kiel ekzemple : «**La Justice**» (Drummondville), «**La Patrie**», «**La Presse**», «**La Pionnier**» (Montreal) k. t. p.

La lasta numero de «**La Lumo**» enhavas tre interesan analizon pri tio.

El la Societoj kaj Grupoj Esperantistaj.

Rimarko de l' Redakcio. Sub tiu ĉi rubriko estos la sciigoj de l' diversaj Societoj, Grupoj kaj Klubo Esperantistaj, rilataj al iliaj membroj, kiujn volos komuniki al ni la sekretarioj. Ni tre esperas, ke ĉiuj societoj kiuj ne havas ankoraŭ propran organon, kaj eĉ aliaj, konsentos uzi tiamaniere nian gazeton.

— **Klubo Esperantista en Stockholm.** Raporto pri ĝia unua kunveno en 1902 (2-an de februaro).

S-ro Ahlberg, sekretario, legis raporton pri la lasta kunveno, kaj sciigis la ĉeestantojn pri la novaj propagandaj. La propagando en Francujo kaj inter la Blindularo aparte interesis la aŭskultantojn.

Poste, la sekvanta estraro estis elektata :

Klubestro : S-ro C. E. Carlsson, bankoficisto en Sundbyberg. Vicestro : S-ro Valdemar Langlet. Kasisto : F-ino Hanna Hemberg. Sekretario : P. Ahlberg (reelektita). Membroj : S-rino Krikortz (reelektita) kaj S-ro Roswall (kiu pro siaj okupajoj devis rifuzi reelekton kiel kasisto).

— **Klubo «Stelo» en Plovdiv.** Jara raporto de l' sekretario :

Fondite la 15-an de februaro 1901, por propagandi Esperanton en Bulgarujo, nia klubo plenumis hodiaŭ sian unuan jaron de ekzistado.

Ĝis nun la agado ne estis tre granda ; la membroj devis ja komenci lerni la lingvon antaŭ ol provi instrui pri ĝi. Tio ĉi hodiaŭ estas farita, kaj estas permesite esperi, ke de nun, nia propagando estos tiom pli agema.

Tamen, la dissendado de artikoloj al gazetoj, la publikaj paroladoj de nia fervora samideano H. Popov paroligis la tutan ĵurnalistaron pri nia lingvo.

La sekvantaj *gazetoj* favore parolis pri ni :

Novosti, Konstitucio, Narodni Prava, Narodna Laŝtita, Bulgara Komerca Gazeto, Obŝtvo Blago, Vestnik, Progreso en Konstantinoplo, Nadejda, Nova Epoko, Telegraf, Republika, Narodno Samonpravlenie, Slovo, Obĉestvo, Veĉerna Poŝta, Svobodnaduna kaj aliaj. *La du grekaj gazetoj* : Edituma kaj Filipopolis. *La turka gazeto* Malumat kaj la revuoj Rodina, Misal, Svet k. t. p.

La Klubo fondis ĵurnalon «**Rondiranto**» presatan ĉiumonate, kies celo estas ekzerci abonantojn pri la lingvo Esperanto. La jara abono estas 3 f. 50.

La Klubo enhavas nun 125 membrojn, el kiuj 6 estas alilanduloj.

La estraro estas: prezidanto H. Bobčev, vicprezidanto T. Kantarjiev, sekretario-kasisto G. P. Oreškov, — konsilantoj: H. Popov, D. Kostakev, T. Kanev, A. Ihsan.

Plovdiv, 16-an de februaro 1902.

G. P. Oreškov, sekretario.

— Unua Societo de l' Aŭstraj Esperantistoj en Brno (Jusa strato N° 8).

La 4-an de februaro 1902 fariĝis la ĝenerala kunveno de la Societo. La sekvanta komitato estas elektita: prezidanto S-ro Pelant, vicprezidanto S-ro Šterc, sekretario S-ro Kajš, vicsekretario S-ro Kramoliš, kasisto S-ro Knofliček, vickasisto S-ro Ne-

pustil, bibliotekisto S-ro Valiček, — membroj: S-roj Zak, Sedlár, Ille, Chiup.

El la raporto de l' sekretario ni eltiras: « La Societo dum la jaro 1901 aranĝis 2 kursojn, 5 amikajn vesperkunvenojn, 1 kostuman amuzadon, 2 propagandajn ekskursojn en provincon, — 27 kunvenoj de l' komitato fariĝis. 446 sciigoj pri Esperanto estas dissenditaj al la redakcioj de bohemiaj kaj germanaj gazetoj en Aŭstrujo. La Societo ricevis 141 leterojn petantajn pri sciigoj pri Esperanto, kaj sendis mem 263 leterojn. »

Se oni pensas ke la Societo estis en la unua jaro de sia ekzistado, kaj devis kompreneble bataladi kontraŭ multaj malfacilaĵoj, oni devas konfesi ke ĝi bonege laboradis por Esperanto.

AVIZO GRAVA. Krom la vojaĝantoj, precipe al la scienculoj kaj komercistoj utilos internacia lingvo.

Rilate al la du lastaj kategorioj, ni ekuzos novan propagandilon.

Senpage ni publikigos, ĝis kiam ni povos, la nomon, profesion kaj adreson de ĉiu ajn komercisto, akceptanta uzadon de Esperanto, kiu petos nin pri tio per poŝtkarto Esperante skribita.

Samtempe, ni petas ĉiujn niajn amikojn, ke ili presigu kaj dispublikigu tiun ĉi avizon kaj tiujn adresarojn ĉien, kien ili povas.

Tio ĉi, unue, pruvos la praktikecon de Esperanto; due, altiros al nia afero multajn komercistojn pro la senpaga reklamo.

Same ni agos rilate al la gazetoj, kiuj akceptas artikolojn en Esperanto.

Ni esperas, ke ĉiuj amikoj de Esperanto helpos al ni por tiu ĉi utiliga entrepreno, kaj povos per tia profito aligi al ni multajn komercistojn.

Oni volu sin turni al la redaktoro de la gazeto: Paul Fruictier, 27, Boulevard Arago, Paris.

« LINGVO INTERNACIA. »

DIVERSAĴOJ.

OPINIOJ.

Esperantista idaro.

Kiam oni deziras kion ajn bonan fortike inokuli al homo, ordinaro tion oni inokulas al li en lia frua infaneco, kaj la rezultato preskaŭ ĉiam estas bonega, ĉar inokulaĵo, kiel oni diras, ensuĉiĝas sangon kaj viandon kaj restas en homo por tuta lia vivo. Malnova, sed provita praktike de multaj dekjaraj teorio! Dume, pro-

pagandante kaj disvastigante nian karan Esperanton ni, ŝajnas al mi, tute nepardoneble forgesas aŭ malpenas la nomitan teorion, flankiginte de nia propaganda laboro niajn fidelajn estontajn apostolojn de Esperanto, niajn — infanojn.

Kion ni donis al ili dum 15 jaroj de ekzistado de Esperanto? . . . Kion? . . . Tute nenion. — Kion ni donas al ili nun? . . . Same nenion. Ĉu ni povas plendi post tio pri mizera farto de Esperanto? Certe ne! Ni mem estas

kulpaj en ĝia malsukceso! Kreu do malgrandan esperantan infanan literaturon, ekinteresigu viajn infanojn laŭ ilia aĝo per legeble presitaj mallongaj rakontoj kaj kantetoj; volu persone provi buŝe kaj skribe transdonadi en Esperanto la sencon de legita de ili rakonto kaj memoriĝadi parkere kantetojn kaj, kredis al mi, ke Esperanto eniĝos ilian sangon kaj viandon kaj el viaj infanoj vi havos multnombrojn anaron da vere naturaj esperantistoj, tre dankemaj al vi kaj neniam kapablaj lasi Esperanton jam sole pro tio, ke ĝi tre larĝe disvolvos ilian spiritan horizonton kaj tre utiliĝos praktike en progresema kaj nesciata de ni estonteco.

E. Radvan-Ripinski.

BIBLIOGRAFIO.

—o—

* *Dictionnaire Esperanto-Français* (Vortaro Esperanto-Franca) de L. de Beaufront. 209-paĝa broŝuro. 1 f 50. Paris, Hachette k. K-io.

Fine, ĝi eliris, tiu jam de tiel longe anoncita kaj senpacience atendita vortaro! Facile legebla, enhavanta multe da internaciaj radikvortoj kaj kunmetitaj vortoj, zorge difinanta la sencojn, ĝi faris ĝenerale bonan impreson. Tuj post ĝia eliro, ĉiuj Parizaj Esperantistoj kuris al la vendantoj, bedaŭrante nur pri unu afero, ke ĝi ne eliris kune kun franco-esperanta vortaro, speco de verko tute ne konata tie ĉi. Felice, oni promesas tiun ĉi lastan por junio!

Kvankam mi ne estas kompetenta, mi permesos al mi fari kelke da kritiketoj pri la ĵus eldonita verko, proklamante tamen ke ĝi estas tute rekomendinda kaj efektivigis grandan progreson. Mi tre esperas ke S-ro de Beaufront ne vidos en tio ian ajn malbonan senton, sed nur sinceran opinion de amiko de Esperanto kaj de li mem kiu deziras helpi la perfektigadon de verko baldaŭ denove presota. Unua eldono de lernolibro aŭ vortaro ne povas ja esti tute senerara. Tio ĉi neniam estus vidita!

Mi do bedaŭras, ke la estimata aŭtoro metis kune la vortojn, kies unua litero estas *c* kaj *ĉ*; *g* kaj *ĝ*; *j* kaj *ĵ* k. c. Mi ja scias, ke la vortoj estas tiel aranĝitaj kaj ordigitaj en la *Universala Vortaro* de D-ro Zamenhof, sed tio ĉi ne estas pravigo. La sursignitaj literoj estas tiel memstaraj, kiel la aliaj, kaj oni ne povus saĝe pretendi ke tipografa simileco kaŭzas esencan samecon. Aparte pri *j* kaj *ĵ*. La litero *ĵ* estas konsonanto, kaj *j* estas duonvokalo, simila al *ŭ*. Estas do bedaŭrinde, ke malsamaj literoj

troviĝas en sama ĉapitro. Mi scias, ke la tempo mankis al S-ro de Beaufront por tion ĉi ŝanĝi; ni esperu, ke li trovos iom por efektivigi tion por la dua eldono.

Aliparte, tia vortordigo kaŭzis multajn preserarojn, kiuj povas embarasi komencantojn. Oni trovas seriojn da vortoj, en kiuj la sursignajoj malestas tie ĉi, kaj troviĝas tie. Ekzemple: *cevalo*, *ĉevalino*, *eevalo-viro*, *ĉevalido*, *cevalidino*, *ĉevalestro*, *cevalisto* k. t. p. Tio ĉi ne okazus, se ĉiuj vortoj en la ĉapitro komencus per *e* aŭ per *ĉ*. La kompostisto aŭ la korektanto ne erarus aŭ konfuzus pro ĉiama intermiksiĝado de *e* aŭ *ĉ* — kaj se ia sursignajo forfalus dum la presado, la legantoj neniam ŝanceliĝus, ĉar ĉiuj aliaj linioj komencus sammaniere.

Poste, mi diros ankoraŭ, ke en neplena vortaro, la senintermanka preso de ĉiuj inaj vortoj, ordinare facile kompreneblaj de ĉiu leganto, ne estas tre necesa; kelkaj aliaj kunmetitaj vortoj pli malsimplaj estus utilaj (ekz. *aimable*; *ferme* . . .), kelkaj radikvortoj kiel *ou* (aŭ); *catastrophe*; *bifteko*; *nouvelle* (novelo); *type* (tipo); *typographie*; *bibliographie*; *compétent* . . . uzitaj de S-ro de Beaufront mem en « L'Espérantiste » estas forgesitaj.

Fine — sed tio ĉi estas nur demando kaj ne kritiko — mi surprizigis legante la tradukojn: *femuro* = *cuisse*, kaj *tibio* = *tibia*! Kial do *tibio* ne povas signifi *jambe* (en la anatomia senco de l' vorto, t. e.: la parto de l' kruro, kiu estas inter la genuo kaj la piedo), kiel *femuro* signifas *cuisse*? (t. e.: parto de l' kruro inter la kokso kaj genuo. Se *femurosto* = *fémur*, laŭ sama maniero, *tibiosto* devas esti *le tibia*. Tio ĉi ŝajnas al mi logika, kaj pli konforma je l' anatomio.

Resume, la suprediritaj negravaj aferoj ne faras ke la nova verko de S-ro de Beaufront ne estas tre bona kaj tre rekomendinda. Ĝi tre certe multe utilos al esperantistoj. Ĉiuj eraroj kredeble estos forpelitaj el la dua eldono, kaj mi ne povas fari pli grandan laŭdon al la aŭtoro, ol konfesi ke mi pli ol unufoje uzis tiun saman vortaron por kritiki lian verkon.

Paris, 12-an de marto 1902.

Paul Fruictier.

INFORMEJO DE ESPERANTISTOJ.

Mi deziras korespondadi per ilustritaj poŝtkartoj kun esperantistoj de ĉiuj landoj. — Adreso: Minsk, (Rusujo,) Policejskaja str., domo de Kantoroviĉ, al Vsevolod Ivanoviĉ Lojko.

Mi deziras havi kolekton da poŝtkartoj kaj entute leteroj kun vidaĵoj (aŭ sen ili), kiu servus al mi kiel bonega argumento ĉe disputoj pri la internacia lingvo kun skeptikuloj. Tial mi petas alilandajn gemikojn-samideanojn, alsendi al mi almenaŭ po unu karto aŭ letero. Al ĉiuj mi respondos per poŝtkarto aŭ per kovrita letero kun vidaĵo aŭ tipoj de Meza Azio (Turkeŝtano). — Mia adreso: Aulie-Ata, — Sir-Dariinsk. obl., Rusujo, al Vladimir Visotsky.

MONOFEROJ POR «L. I.»

En la lasta tempo ni ricevis la sekvantajn monoferojn por la fondkapitalo de nia gazeto:

- S-ro A. Kofman (Odessa) 5 rubl.
- S-ro N. Kazi-Girej (Tjellin, Norda Ĥinuĵo) 4 rubl.
- S-ro H. Stahlberg (Vezenberg, Rusujo) 6.30 kron. [kalkula resto].

Fraŭlino Ella Scheerpeltz (W.-Meseritsch, Moravujo) 1.75 kron. [kalkula resto].

Koran dankon!

La administracio.

PROBLEMOJ.

De pdl.

VI.

and etoen i nen o rof siapa tasp trol ues.

(Aranĝu tiujn ĉi laŭ bezona vico.)

VII.

- | | | | | | | | | | |
|------------------------------------|----|----|----|----|-------------------|----------------|-----------|---------------|---------------|
| 31 | 3 | 15 | 11 | 26 | Rivero en Rusujo. | | | | |
| 20 | 9 | 16 | 5 | 12 | 1 | 27 | Planedo. | | |
| 23 | 12 | 5 | 19 | 32 | Frukto. | | | | |
| 11 | 22 | 30 | 8 | 24 | 28 | 17 | 1 | 27 | Vira vestaĵo. |
| 28 | 17 | 19 | 31 | 13 | 30 | Granda urbo. | | | |
| 7 | 5 | 28 | 14 | 5 | 26 | 32 | Mineralo. | | |
| 28 | 4 | 28 | 21 | 13 | Blanka floro. | | | | |
| 10 | 5 | 19 | 14 | 28 | 13 | 26 | 32 | Flava floro. | |
| 6 | 16 | 18 | 12 | 30 | 9 | Dio estas tia. | | | |
| 2 | 28 | 6 | 14 | 22 | 1 | 25 | 27 | Granda besto. | |
| 29 | 31 | 17 | 28 | 14 | 13 | Vira nomo. | | | |
| 1-32. Proverbo preskaŭ internacia. | | | | | | | | | |

VIII.

4e4iue78a756o2e8oe47ia5a86o3a41o.

(Anstataŭ la ciferoj metu konsonantojn.)

— La solvojn de tiuj ĉi problemoj ni presos en la n-ro 5, kune kun la nomoj de l' divenintoj. La solvojn oni sendu al la administranto.

Solvoj de la problemoj trovataj en la n-ro 1:

I. Omaro — maro. La solvon de la problemo II-a montras la apuda tabelo.

10 sit.	7 sit.	3 sit.
10	0	0
7	3	0
4	6	0
1	6	3
1	7	2
8	0	2
8	2	0
5	2	3
5	5	0

Divenis ambaŭ problemojn: N. Studenov, Sam, Dimitrij Iljin, S-rino Caroline Wieslander, O. kaj K. Bezin; unu problemon: I. Maliŝev, Dimitrij Piskunov, H. Sewigh, P. Konstantinov, □.

HUMORAĴO.

Ŝanceliĝo. — Kiamaniere mi devas komenci mian leteron? li estas ja influanto! ĉu mi metos: «Tre honorata majstro»? — Ĉu vi estus freneza? al tia kanajlo! Skribu nur: «Mia kara kolego»...

Ĉe apotekisto. Sinjoro (tre incitita): Rigardu! vi donis al mi morfinon anstataŭ kininon — —

La apotekisto (trankvile): Estas eble. Nu, vi do ŝuldas al mi unu frankon.

Poŝta kesteto de la redakcio.

Al S-ro P—v. «Al Bulgaraj Esperantistoj» ni ne ricevis. Sinceran bedaŭron!

Al S-ro Vs. L—o, en Minsk. Jes! al la du demandoj. Koran dankon!

Al S-ro O—v, en Plovdiv. Koran dankon pro via adresaro! La gazeto estos ĉiam presata en Szegzárd, kie loĝas l' administranto. Nur la redakcio estas en Paris. La citita de vi firmo H. estas tute ekster tio.

Al S-ro E. L. S., en Doylestown. Tiu ĉi formo neniam estis uzata de D-ro Zamenhof, nek de alia Esperantisto. Via argumento estas bona; ni denove parolos pri ĝi. Amikan saluton!

Al S-ro Vefsteler. «La pasero» jam estas presita en L. I. 1896, n-ro 10—11, p. 207, traduko de V. Halperin. Ni bedaŭras.

Al S-ro A. Z—v. Vian artikolon ni presos. Sed tre certe ĝi naskos kontraŭajn respondojn.

Al ĉiuj Esperantistoj, kiuj havis l' afablecon skribi al mi pri mia redaktorigo, mi sendas mian koran dankon, kaj petas, ke ili pardonu mian nerespondon; sed la tempo tute mankas al mi por tio, kaj certe ili preferos, ke mi pasigu ĝin, laborante pri L. I. P. F.

oo

ANONCOJ.

Antaŭaj jarkolektoj de L. I. estas riceveblaj de la direktoro de l' gazeto en Szegzárd. Jarkolekto 1900 kostas duonprezon (2.88 fr.), jarkolekto 1901 tutprezon (5.75 fr.). & & &

«**Rondiranto**» Ilustrita gazeto de l' Bulgaraj Esperantistoj.

Eliras ĉiumonate, redaktata en lingvoj Esperanto kaj bulgara. Kosto de abono por jaro 3.50 frankoj. Oni abonas ĉe la sekretario de l' klubo «Stelo», S-ro G. P. OREŠKOV, en Filippopol (Plovdiv, Bulgarujo).

La administranto de L. I. en Szegzárd akceptas abomonon per «Rondiranto».

Rusaj Esperantistoj!

Nia fervora samideano S-ro M. S. Rakitski donacis por L. I. 100 ekzemplerojn de sia verko

Mjetod obučeniĝa gramotje

(Metodo por instruado de skriboleĝo). La verko estas ricevebla de la kasiso de l' Societo Espero, en S. Peterburgo (Kriukov kan. d. 27, kv. 6, S-ro V. Kurmanajev), kaj ĝia prozo estas 50 kop., por Esperantistoj 45 kop.

Kartoj kun vidaĵoj de la beleĝa Holando.

Esperantistoj-kolektantoj petu provan numeron de

LA ILUSTRITA POŝTKARTO

monata gazeto por kolektantoj de ilustr. poŝtkartoj.

Ĉiu numero havos aldonon en nia kara lingvo internacia. Kosto de abono por eksterholandaj landoj: 3 frankoj; kun granda Adresaro de kolektistoj.

Redakcio-Administracio: A. H. KALIS, Esp-o n. 6186, C. 55, DRUTEN, Gelderland, Holando.

GRANDAJ VINOJ DE BOURGOGNE

Moreau-Voillot

Beaune (Côte d'Or) Francujo.

Firmita en 1786, daŭrigata de patro al filo. Akceptas honorindajn reprezentantojn korespondantajn Esperante.

Tri poŝtmarka-kolektistoj deziras interŝanĝi **Finlandajn poŝtmarkojn** kun eksterlandaj kolektistoj. Oni sin turnu al

S-ro **Aug. Th. Laurén**,
en **JYVÄSKYLÄ** (Finlando).

Esperanto-ŝercoj

en vortoj kaj figuroj.

Ungherrarnes Egen (Gazeto propra de la Fraŭloj). Svedujo, invitas por abono la mondon Esperantan, **Ungherrarnes Egen** eliras en 1902. j. 26 fojojn. Ĉiu numero estas sendata en banderolo.

Kosto por jaro: 2 kr. 88 oer. (4 fr.), du ekz. 4 kr. 32 oer. (6 fr.) — Provan numeron senpage.

Adreso: UNGHERRARNES EGEN, Askersund, Sverige.

ACÉTYLÈNE * ÉCLAIRAGE

MAŜINOJ — BRULOJ — KORESPONDO

J. SABATIER, 233, rue St. Martin, PARIS.

ĈU VI VOLAS HAVI BONEGAN KOLEKTON de 100 aŭ pli da elektitaj poŝtmarkoj bulgaraj? Sendu almenaŭ 25 purajn poŝtkartojn ilustritajn

al S-ro **Asen Astadjoff** (instruisto)
en **Razgrad** (Bulgarujo)

kaj tuj li plenumos vian deziron per la unua poŝto.

KANTO AL LA FLAGO DE PACO

VORTOJ DE V. LANGLET

MUZIKO DE CL. ADELSKÖLD.

ARANĜITA POR KVAR VOĈOJ

KOSTAS 40 CENTIMOJN. — RICEVEBLA DE

P. AHLBERG, SEKRETARIO DE LA KLUBO

ESPERANTISTA

STOCKHOLM (SVEDUJO), DÖBELNSGATAN 50.

Oni abonas L. I.

ĉe

L' administranto de la gazeto S-ro PAUL de LENGYEL en Szegárd (Hungarujo).	La redaktoro de la gazeto S-ro PAUL FRUICHTER 27 Boulevard Arago 27 en Paris (Francujo).	D-ro L. ZAMENHOF ul. Dzika N° 9 en Varsovio (= Warszawa) (Rusujo).	S-ro RENÉ LEMAIRE Sekretario de S. p. p. E. en Épernay (Marne) (Francujo).
--	---	---	---

Kosto de abono por jaro: 5.75 frankoj = 5.50 hungaraj kronoj = 4 skand. kronoj = 4.50 germanaj markoj = 2 rubloj. Unu numero kostas 50 centimojn. Abonoj estas akceptataj nur por 3/4 de ilia valoro.

Pago por anoncoj: 30 centimoj = 30 heleroj = 22 oeroj = 24 pfenigoj = 12 kopekoj por duonpaĝa petiltinio; ĉe pli granda anoncado estas donata rabato laŭ reciproka konsento. — Pagi por anoncoj oni povas ĉe la kvar supronomitaj sinjoroj, sed la tekston oni sendu nur al la administranto aŭ al la redaktoro.

AVIZO GRAVA. Manuskriptojn oni sendu nur al la redaktoro, kies nomon oni devas ĉiam skribi. Nepresitajn manuskriptojn ni ne resendadas.